

La Nobel-premiitoj : Centa datreveno de la naskiĝo de la Nobel-pacpremiito

Albert Schweizer, 2-a parto

Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI 590, 1975.01.29 & 02.01

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Por festi la jubileon Albert Schweitzer ni prezentas al vi historieton de la Nobel-pacpremiado. Vi aŭdas la duan prelegon pri tiu temo.

A.- La tuta vivo de Alfred Nobel estis dediĉita al la venko de eksplodiloj, en la celo povi uzi iliajn fortojn profite al la konstruo de pli homeca civilizo. Alfred Nobel bone konsciis, ke ankaŭ inter la popoloj ekzistas eksplodemaj konfliktoj, kiuj kondukas al la militado. Oni devas trovi rimedojn por malhelpi la internaciajn eksplodojn.

Cl.- Tial ne estas mirige, ke Alfred Nobel interesiĝis pri la celadoj de la pacistoj. Kun la baronino **von Suttner** (1843-1914) li korespondis kaj renkontiĝis jam antaŭ ol ŝia romano **Die Waffen nieder !** ŝin mondfamigis, tio en 1889. En 1876 li provis ŝin dungi kiel sekretariinon. En 1887 li diskutis kun ŝi en Parizo.

A.- Al la pacistoj Alfred Nobel riproĉis mankon de vera programo. En 1891 sendante subvencion al la baronino por ŝia porpaca laboro li profitas ĝuste riproĉi al ŝi tiun mankon de praktika programo. Li esprimis dubojn pri la sukceso de la projektoj celantaj kompletan malarmadon. Ankaŭ la starigo de arbitracia kortumo ŝajnis al li neefektivebla per unu sola paŝo antaŭen.

Cl.- Alfred Nobel faris praktikan proponon, montrante, ke li estis jam multe meditante pri la temo. Li sin demandis, kial oni ne ekagus kiel la britoj. En Britio, kiam oni troviĝas antaŭ nova situacio, anstataŭ abstrakte diskutadi oni pragmate redaktas provizoran leĝon. Kaj oni ekfunkciigas tiun leĝon por limigita tempo. Poste jaron post jaro oni reenkondukas tiun leĝon, ĝin perfektigante, kiam tio montriĝas necesa.

A.- Kaj Alfred Nobel proponis, ke la pacistoj akceptu diskuti projekton de internacia arbitraciado limigita en la tempo. Oni petu la registarojn, ke dum unu jaro ili sin devigu submeti antaŭ tiucele starigita tribunalo ĉiujn konflikto-agojn. Jaron post jaro la registaroj povus renovigi tiun provizoran leĝon.

Cl.- Unu jaron poste, dum aŭgusto 1892, disvolviĝis en Berno packongreso, kie baronino **Bertha von Suttner** ludis ĉefrolon. Siaflanke Alfred Nobel feriadis en Zürich. Li profitis la okazon por viziti la baroninon en Berno mem. Estas en tiu okazo, ke li esprimis la esperon, ke liaj uzinoj alportos finon al ĉiuj militoj pli rapide, ol la packongresoj. « *La tagon, kiam du armeoj havos la povon sin reciproke detrui en unu sekundo, la civilizitaj nacioj ne plu kuraĝos intermiliti.* »

A.- Tamen Alfred Nobel ne plene konvinkiĝis pri la propra argumentado. Li ne nur atente tralegis la dokumentojn de la berna packongreso. Ankaŭ li komencis agadi favore al la paco. Li petis eksdiplomatoni ekzameni ĉiujn proponojn ĝis tiam prezentitajn kaj fari iliajn kritikojn. Li deziris trovi rimedon por povi akceptigi leĝon por la dueloj inter la nacioj, kiel leĝoj ĉesigis la duelojn inter la individuoj. Laŭ li oni elektu atestantojn, kiuj ekzamenos, ĉu inter duelemaj ŝtatoj vere ekzistas batalkaŭzoj. Li opiniis, ke ĉiu antaŭa ekzameno de la kaŭzoj eksolvus la konfliktojn.

Cl.- Oni nature elektus, kiel atestantojn, ĉu neŭtralajn registarojn, ĉu verajn tribunalojn, kiel la Ĉambron de la Lordoj en Britio aŭ Altan Kortumon.

A.- Unu jaron poste, tio estas en 1893, li skribis al baronino Bertha von Suttner : « *Mi ŝatus dediĉi parton de mia riĉaĵo al la kreado de premifonduso disdonota ĉiujn kvin jarojn. Tiun premion oni aljuĝus al tiu, kiu permesus fari al Eŭropo la plej grandan paŝon en la direkto de ĝenerala paciĝo.* »

Cl.- Alfred Nobel sin demandas, kial, anstataŭ fari trioblan aliancon, oni ne povas fari aliancon, kiu grupigas ĉiujn ŝtatojn. Oni devas nepre alveni al deviga arbitracio de la internaciaj konfliktoj, se oni volas eviti fali en monstran barbarecon.

A.- En 1895 li skribas al sia nevo Hjalmar Nobel, ke li ŝatus akiri la plimulton de la akcioj de la ĵurnalo *Aftonbladet* por interalie « *lukti kontraŭ la armado kaj aliaj eksmodaj uzoj* ». Dek tagojn antaŭe li estis subskribinta la testamenton, kiu naskos la Nobel-premiadon. Kvinono de la interezoj de lia riĉaĵo devos rekompenci jaron post jaro « *la personecon, kiu estos plej multe kaj plej taŭge kontribuinta al la pliproksimigo de la popoloj, al la fortigo aŭ redukto de la konstantaj armeoj aŭ al la organizo kaj diskonigo de packongresoj* ».

Cl.- La jaron poste Alfred Nobel mortos. Kaj jam la 10-an de decembro 1901, tio estas ekzakte ses jarojn post la subskribo de lia testamento, la Nobel-pac-komitato rekompencos du homojn pro ilia laboro favore al la paco. Iliaj nomoj estas Henry Dunant kaj Frédéric Passy.

A.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo!